

Notico de la redaktoro

Christer KISELMAN

Kara leganto

Bonvenon al la unua kajero de nova revuo! Ĝi aperigos sciencnivelaĵn artikolojn pri ĉiuj aspektoj de la lingva, socia kaj psikologia fenomeno Esperanto. Ĝi havas dulingvan nomon por indiki ke ĝi enhavas artikolojn en Esperanto same kiel en naciaj lingvoj. Ĝi aperas ĝemele: kaj papere kaj rete. Tiel mi esperas maksimumigi la akireblon de la revuo.

La revuo iel estas daŭrigo de iama revuo: Paul Neergaard eldonadis dum la jaroj 1949–1961 revuon kun la titolo *Esperantologio*. Aperis entute ses kajeroj.¹ Dum longa tempo mi cerbumadis pri diversaj manieroj revivigi la revuon. Por certigi altan kvaliton mi deziris havigi al ĝi teamon de elstaraj esperantologoj kaj lingvistoj. Mia propono estis bonvenigita de ĉiuj al kiuj mi skribis. Ili nun formas la redaktan komitaton, kaj mi kore dankas al ĉiuj membroj de la komitato pro ilia apogo kaj laboro por tiu ĉi unua kajero.

La termino *esperantologio*

Kion do signifas la termino *esperantologio*? Enkondukis ĝin Eugen Wüster. Li faris tion en artikolo aperinta en 1921 en la gazeto *Esperanto Triumfonta* (poste *Heroldo de Esperanto*). En la revuo *Esperantologio* li rakontas la historion de la termino, same kiel tiun de *interlingvistiko* (Wüster 1955). Por Wüster *esperantologio* signifas tiun branĉon “de la ‘sinteza lingvistiko’, kiu estas aplikata al la jam multe uzata sistemo Esperanto”. Kaj per *sinteza lingvistiko* li komprenis “tiun relative novan branĉon de la lingvistiko, kiu ne nur konstatas, sed kiu konscie influas (gvidas) la evoluon de lingvo” – nuntempe oni dirus lingvoplanado. Sed li citas ankaŭ diverĝajn opiniojn, i.a. tiun de W. J. A. Manders, laŭ kiu esperantologio “estas scienco konstata kaj priskriba” (Wüster 1955:211). La nomo de la nuna revuo estu komprenata en tiu senco de Manders.

Grava por la fruaj laboroj en esperantologio estis la verko *La Esperantologio kaj ties disciplinoj*, kiun publikigis Paul Neergaard en 1942. Tie li detale priskribis la subfakojn de la esperantologio, kaj skizis la necesajn estontajn taskojn.

La politiko de la revuo

La fenomeno Esperanto estas malfacile kaptebla kaj malfacile difinebla. Laŭ miaj spertoj ĝi signifas plej malsamajn aferojn por malsamaj homoj. Multaj revoj estas ligitaj al ĝi. La fortoj kiuj inspiras personojn okupiĝadi pri la lingvo estas diversaj kaj malfacile priskribeblaj. Estus malfacile formuli priskribon de tiuj fortoj pri kiuj

¹La enhavtabeloj de ĉiuj kajeroj estas legebla en la reto sub la adreso <http://www.math.uu.se/esperanto>.

diversaj personoj konsentus. Eble la plej origina kaj plej profunda estas la eldiro de Zamenhof en 1905: “[...] mi en la nuna momento ne estas ia naciانو, sed simpla homo [...]” (Zamenhof 1929:365).

La revuo estas bazita sur sciencaj principoj. Tial ni devas resti ĉe la “konstata kaj priskriba” scienco de Manders. La revuo ne publikigos proponojn pri lingvaj reformoj.

La politiko de la revuo estas okupiĝi pri la ekzistanta lingva kaj socia fenomeno Esperanto. Tamen tio ne malhelpas ke ni iam eble diskutos pri tio kio estas aŭ povus esti la objekto de la esperantologio.

Pri tiu ĉi kajero

Ĉar la revuo estas ia daŭrigo de la revuo redaktita de Neergaard, ni dediĉas iom da spaco al lia vivo kaj laboro. Ni publikigas en tiu ĉi unua kajero tri artikolojn rilate al li.

Mi aparte ĝojas ke Marjorie Boulton permesis ke aperu ĉi tie ŝia manuskripto verkita omaĝe al Paul Neergaard. Ĝi estas eseo kiu radias ne nur detalan konon pri lia personeco, sed ankaŭ profundajn sentojn rilate al lia tuta laboro kaj vivo.

Carl Støp-Bowitz verkis mallonge post la morto de Paul Neergaard eseeton pri ties terminologia laboro.

La artikoloj de Boulton kaj Støp-Bowitz estis origine verkitaj por provo revivigi la revuon de Neergaard en 1987–1988. Humphrey Tonkin afable transdonis la manuskriptojn al mi.

Birthe Lapenna rakontis al mi ke ŝi posedas artikolon de Paul Neergaard mem, verkitan honore al Ivo Lapenna. Ŝi afable permesis enmeton de tiu artikolo. Tiel ni povas iom konatiĝi kun la pensmaniero de Neergaard rilate al vortaraj difinoj.

Tamen la menciitaj tri kontribuaĵoj estas esceptaj pro sia historia karaktero. La kvar sekvaj rilatas al lingvaj kaj sociaj aspektoj de la lingvo.

Geraldo Mattos, la prezidanto de la Akademio de Esperanto, kontribuas per artikolo pri la Fundamento de Esperanto. Tiu ĉi dokumento el 1905 ludas por la lingvo gravan rolon, iom anstataŭante la longan tradicion de aliaj lingvoj.

Detlev Blanke priskribas la aktivecon de societo, kiun li prezidas.

Sabine Fiedler prezentas al ni studon pri la frazeologio de Esperanto, bazitan sur tre ampleksa disertaĵo.

Fine ni publikigas pioniran studon de Marc van Oostendorp pri la fonologio de Esperanto, pli precize pri ĝia silaba strukturo.

Bibliografio

Paul Neergaard (1907–1987)

1942 La Esperantologio kaj ties disciplinoj. Taskoj kaj rezultoj. En: *Tra densa mal-lumo*, pp. 37–64. Kopenhago: Laborista Esperanto Klubo.

Eugen Wüster (1898–1977)

1955 La terminoj “esperantologio” kaj “interlingvistiko”. *Esperantologio* 1, N-ro 4, 209–214.

L. L. Zamenhof (1859–1917)

1929 *Originala verkaro. Antaŭparoloj – Gazetartikoloj – Traktaĵoj – Paroladoj – Leteroj – Poemoj*. Lepsiko: Ferdinand Hirt & Sohn.

Editorial Statement

Christer KISELMAN

Dear reader:

Welcome to the first issue of a new journal! It will publish works on all aspects of the linguistic, social, and psychological phenomenon Esperanto. Its name is bilingual, to indicate that it will contain articles in Esperanto as well as in other languages. It appears in a print version as well as in an electronic version. In this way I hope to achieve maximum availability.

The journal is a kind of continuation: Between 1949 and 1961, Paul Neergaard published a journal with the name *Esperantologio*. A total of six issues were published.¹ For a long time I was thinking about various ways to revive the journal. To guarantee high quality, I felt it would be essential to attract outstanding esperantologists and linguists to the idea. My proposal was welcomed by all the persons I contacted. They now form the Editorial Board, and I am most grateful to all of them for their support and for their efforts in the preparation of this first issue.

On the term *esperantologio*

The term *esperantologio* was introduced by Eugen Wüster in an article which appeared in 1921 in the journal *Esperanto Triumfonta* (later to be renamed *Heroldo de Esperanto*). In an article published in the journal *Esperantologio* he recounts the history of this term as well as that of *interlingvistiko* (Wüster 1955). For Wüster *esperantologio* denotes that branch of *sinteza lingvistiko* ‘synthetic linguistics’ which is applied to the already much used system of Esperanto. By *sinteza lingvistiko* he understands that relatively new branch of linguistics which not only observes but consciously influences (guides) the development of a language—nowadays we would say language planning. But he quotes other opinions as well, among them that of W. J. A. Manders, according to whom *esperantologio* is a science which observes and describes (Wüster 1955:211). The name of the present journal is to be understood in this sense.

The article *La Esperantologio kaj ties disciplinoj*, which Neergaard published in 1942, was important for early works on Esperanto. There he described in detail the various subbranches of Esperanto studies, and sketched the steps to be taken.

The policy of this journal

The phenomenon Esperanto is difficult to pinpoint. In my experience, it signifies very different things to different people. Many dreams are attached to it. The forces which inspire persons to learn and explore the language are of many kinds and hard to describe. Indeed it would be difficult to formulate a description of these forces

¹The tables of contents of all issues is available on the web at the URL <http://www.math.uu.se/esperanto>

on which people could agree. Maybe the most original and deepest of them is what Zamenhof pronounced in 1905: “[...] mi en la nuna momento ne estas ia naciano, sed simpla homo [...]” (at this moment I am not a member of any nation, but a simple human being; Zamenhof 1929:365).

This journal is based on scientific practice. Therefore we shall keep to Esperanto studies as an observing and describing science in the sense of Manders. The journal will not publish proposals to reform the language.

The policy of the journal is to study the existing linguistic and social phenomenon of Esperanto. However, this does not exclude the possibility that we might discuss in a coming issue what is or could be the objective of *esperantologio*.

On this issue

Since this journal is a kind of continuation of that edited by Neergaard, we devote some space to his life and work.

I am particularly happy that Marjorie Boulton permitted the inclusion of her paper in memory of Paul Neergaard. It is an essay prepared not only with a detailed knowledge of his personality but also with deep feelings concerning his whole life and work.

Carl Støp-Bowitz wrote soon after the death of Paul Neergaard a short essay on Neergaard’s work on scientific terminology.

The papers by Boulton and Støp-Bowitz were originally written for an attempt to revive Neergaard’s journal in 1987–1988. Humphrey Tonkin was kind enough to send me their manuscripts.

From Birthe Lapenna I received an article by Paul Neergaard himself, written in honor of Ivo Lapenna. She kindly consented to have it included here. In this way we can to some extent become acquainted with Neergaard’s thoughts on lexicology.

However, the three contributions just mentioned constitute a kind of exception due to their historical character. The four others are related to the linguistic and social aspects of the language.

Geraldo Mattos, the president of the Esperanto Academy, contributes an article on the *Fundamento* of Esperanto. This document from 1905 plays an important role in the language, in some measure replacing that of the long tradition of other languages.

Detlev Blanke describes the activities of an association of which he is the chairman.

Sabine Fiedler presents a study on phraseology, which is based on her extensive dissertation.

Finally we publish a pioneering study by Marc van Oostendorp on the phonology of Esperanto, more precisely on its syllable structure.

References

- Paul Neergaard (1907–1987). 1942. La Esperantologio kaj ties disciplinoj. Taskoj kaj rezultoj. In: *Tra densa mallumo*, pp. 37–64. Copenhagen: Laborista Esperanto Klubo.
- Eugen Wüster (1898–1977). 1955. La terminoj “esperantologio” kaj “interlingvistiko”. *Esperantologio* 1, No. 4, 209–214.
- L. L. Zamenhof (1859–1917). 1929. *Originala verkaro. Antaŭparoloj – Gazetartikoloj – Traktaĵoj – Paroladoj – Leteroj – Poemoj*. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn.